

NORMANDA ESPERANTO BULTENO



ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas : Pierre Lemarchand, 2 les Terres Quemines 76113 Hautot sur Seine. Tel. 02 35 34 28 78
LEMARCHANDPI@wanadoo.fr

Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.



Ni kunvenos en Betteville (76)

MUSIQUES TRADITIONNELLES du JAPON, de NORMANDIE et d'Ailleurs

Echanges musicaux entre
espérantistes japonais
HORI Jasuo, ARAI Tošinobu
et musiciens locaux

LUNDI 5 MAI 2008

Maison du Peuple à COLOMBELLES

de 18 à 20h

Association HEROUVILLE -ESPERANTO

nicosibi@club-internet.fr

Association Normande ,Tchèque et
Slovaque


ants.caen@wanadoo.fr

ENTREE LIBRE

Vous trouverez à l'intérieur le bulletin d'adhésion pour notre Assemblée Générale du **24 et 25 mai**. Elle se déroulera comme prévu non loin de la Seine dans le petit village de **Betteville**. (Seine Maritime). Nous vous avons, à chaque bulletin depuis juillet 2007 (n°231), donné quelques informations, et vous aviez certainement noté ce rendez-vous sur votre agenda.

Ne tardez donc pas à nous renvoyer votre bulletin de participation avec votre règlement.

Beau temps assuré et ambiance conviviale prévue !
*Ĝis baldaŭ en la loĝejo « **La CHAUMIERE** », nia pajlategmenta dometo !*



En tiu numero :

La unua telegrafo.	2 + 4
Ĉe la Lago Bajkalo.	3
Dua listo Kotizantoj.	3
Recepto Kokidaĵo kun viskio.	4
INTERNE : Aliĝilo al nia Ĝenerala Kunveno.	

La unua Telegrafo


En nia nuna epoko de Interreto, telefono, televi-
do, aviadiloj, ktp, ni ne tre bone konscias pri la
malfacileco de komunikoj antaŭ nur du jarcentoj.
Du semajnoj estis necesaj por trandoni informon
de Parizo al Marseille.

Provoj estis okazintaj komuniki pli rapide ol ĉe-
vale, ĉu per fajroj de distanco al distanco, ĉu per
sono de sinsekvaj kanonoj. Sed la efektivigo de
tiaj ideoj estis tre multekosta, kaj la rezultoj
rudimentaj.

La nova spirito kiu fontis el la Franca Revolucio,
kaj ankaŭ la necesoj de la rezultantaj militoj,
ebligis la realigon de invencio de franca inĝeniero
Claude Chappe (1763 - 1805) ; oni poste nomis
tiun invencion « *optika telegrafo* ».


La bazaj ideoj estis simplaj, kaj oni povis miri ke
neniu estu pensinta pri ĝi multe pli frue ; sen
droni en detaloj, jen tiuj bazaj ideoj :

- 1° Inter du lokoj kiuj devas esti ligitaj por
interŝanĝo de informoj, oni sinksekve dis-
metu, sur kiel eble plej rekta linio kunliganta
ambaŭ lokoj, sur altaĵoj aŭ turoj distancaj
de ses ĝis dek du kilometroj, semaforojn
(greke : signalportanto).
- 2° Tiuj semaforoj konsistu el sep metra
vertikala masto sur kies supro estu fiksita
en sia centro kvazaŭ tabulo de kvar metroj
ses dek centimetroj ; tiu « tabulo » povu
rotacii en unu ebena ; oni nomu tiun
« tabulon », « la regulilo » ; ĉe ambaŭ eks-
tremaĵoj de la regulilo, oni metu ĉe unu el
ĝiaj ekstremaĵoj, « tabulon » du metran, kiu
ankaŭ povu rotacii, laŭ la sama ebena kiel la
regulilo ; oni nomu la du « tabulojn » : « la
flugiloj ». La ĉi apuda krokizo skemas sema-
foron.
- 3° Oni fikse orientu la
ebelon entenantan la
regulilon kaj la flugilojn
vertikale kaj perpendi-
kle al la ĝenerala direk-
to de la linio.
- 4° En ĉiu stacio de semaforo estu kons-
truaĵo en kiu deĵorantaj oficistoj povu de



interne, per adekvataj simplaj mekanismoj
kaj kabloj, facile doni difinitajn poziciojn
(vidotaj poste), al la regulilo kaj al la flugiloj.

- 5° Oni aldonu en la konstruaĵo du potencajn
binoklojn nemoveble
fiksitaĵoj tra la mu-
roj, unu direkte al
la antaŭa stacio, la
dua direkte al la
sekvanta.



- 6° Pro longdistanca videbleco, oni uzu du el la
eblaj pozicioj : la horizontala kaj la vertikala,
kiel skizite sur la ĉi supra bildo.
- 7° Por la flugiloj, oni konsideru nur la ok po-
ziciojn, kiuj ek de la vertikalo, estas aparti-
gitaĵoj per anguloj de 45 gradoj. Tiuj pozicioj
estos jenaj por unu el la flugiloj :



Oni eliminu la pozicion 7, pro konfuzebleco kun la
pozicio 3.

- 8° Kombinado de la akceptitaj pozicioj de
la regulilo, kaj de la du flugiloj kondukas al :
 $2 \times 7 \times 7 = 98$ perfekte difinitaj kaj disting-
eblaj pozicioj de la semaforo.

La deĵoranta oficisto estis perfekte formita por
observi la signalojn de la semaforo situanta al-
monte al li, kaj tuj rapidege prenigi al la sia la sa-
man signalon, kiu estis observita de la oficisto de
la sekva, alvala semaforo. Kompreneble la site-
mo ne povis funkcii nokte aŭ nebulvetere.

La originala trovaĵo de *Chappe* kuŝas en la uzo de
la 98 eblaj signaloj. Li ne kontentiĝis per atribuo
de aparta signalo al la 26 literoj de la alfabeto, 10
ciferoj, 20-o da interpunkciaj aŭ kurantaj mate-
matikaj signoj, kaj sende de la mesaĝoj laŭlitere.
Tio estus estinta tre longa, kaj komprenebla por
ĉiu observanto de kiu ajn stacio.

Li do imagis sistemon en kiu ĉiu aparta ebla po-
zicio de la semaforo .../..... **Sekvo paĝo 4a**

Ĉe la lago Bajkalo.

Dum unu semajno, ni partoprenis R.A.-n (**Renkontiĝo de Amikoj**) ĉe la lago Bajkalo, en Sibe-rio.

Se vi volas trovi tie bonajn materialajn kondiĉojn, kun komforta dormĉambro, kiu entenas duŝon, ne-cesojn, murŝrankon kaj tiel plu

Ne iru al tiu R.A. !

Se vi volas trovi belan restoracion, bongustan me-nuon...

Se vi ne volas prepari manĝon por kvindek perso-noj sur ekstera ligna fajro ...

Se vi ne ŝatas eksteran necesojn ...

Ne iru R.A. - n !

Sed Se vi deziras renkonti spertajn, ĉarmajn zorgemajn, atentemajn junajn esperantis-tojn ...

Iru R.A. - n !

Ĉi-tie, vi travivas ĉarman etoson, seriozajn espe-rantajn programojn, ludojn (kiujn vi povos importa-di en viajn klubojn).

Du fojojn, vi povos sperti tradician rusan banon en malvarma loko.

Ĉi-tie, vi trovos sovaĝan vilaĝon, sen stratoj, (nur vojetoj sen makadamo), ĉevalojn kiuj povas vagi trankvile en la kamparo, kaj trinki laŭvole puran akvon ĉe la lago.

Ĉi-tie, vi povos paŝi laŭ la lag-bordo kaj admiri la mirindan pejzaĝon ! Ne necesos ke vi kunportu vian bankalsonon ! Dum julio, la temperaturo de la akvo atingis proksimume 6 gradojn. (Kelkaj siberianoj sukcesis sin akvumi kelkajn sekundojn ! Eĉ por la ekstremaĵo de niaj piedoj, tiu-ĉi akvo estis tro mal-varma).


Se vi estus sufiĉe pacienca, vi povus ekvidi (kiel Ĵerar) la solajn fokojn, kiuj vivas en sensala akvo.

Konkludo :

Iru al tiu R.A. - n !

Tiu sperto estas neforgesebla !

Ĵiji SENEAL



Dua listo de kotizintoj por 2008

Rigardu ĉu via nomo estas en ĉi-suba **DUA** listo : *Ge-Sinjoroj* :

Ge - COLBERT, COLOMBEL, DEFRANCE, DUBOIS, DUBUC, DUVAL, ERHARD, FRESLON, GIBERT, GUEROULT, HELBERT, LEBRETON, LEBRUN, LECOUVREUR, LELOUEY, LEVESQUE, LOISEL, MAGEREL, MARIE, MICHAUD, NARDIN, NICOLAS, PARIS, PAUMIER, QUILLAUD, RAUCH, SCHERTZER, SENEAL, TURMEL.

Faru vian ĉekon profite de **ESPERANTO-NORMANDIE CCP 283 40 H ROUEN**

Abon-kotizo por 2008 : 8 Eŭroj, kaj sendu ĝin al la kasisto : .

Pierre Lemarchand, 2 Résidence Les Terres Quemines. 76113 Hautot sur Seine.



Sekvo de la paĝo 2a. :

.../...respondis al unu difinita litero, cifero, interpunkcia aŭ matematika signo, sed ankaŭ al difinita vorto kaj eĉ ofte al tuta esprimo aŭ kuranta frazo.

Unue li atribuis ses signalojn al korespondado inter si de la staciuloj; restis 92 signaloj por transdono de mesaĝoj. Tiucele, li kreis tri katalogojn, numeritajn 1, 2, 3; ĉiu katalogo havis 92 paĝojn. Ĉiu paĝo havis 92 liniojn.

Li tiel havis je sia dispono $92 \times 92 = 8464$ linioj po katalogo. Li atribuis apartan bone difinitan vorton al ĉiu linio. Tiel por transdoni difinitan vorton aŭ esprimon, sufiĉis per la semaforo indiki tri numerojn: la unua, 1 aŭ 2, aŭ 3, indikis en kiu katalogo la vorto troviĝis. La dua numero indikis la paĝon de la dirita katalogo, kaj la tria la linion de la rilatita paĝo.

Nur tre malmultaj respondeculoj en bonege garditaj oficejoj, apud Prefektejoj, posedis ekzempleron de la sekretaj katalogoj kaj ricevis desegnaĵon de la tuta ricevita signaro, kiu konstituis la mesaĝon. Ili deĉifris ĝin kaj transdonis la mesaĝon al la adreso per ordinara portisto.

En sia kunveno de la 1a de aprilo 1794, la *Convention Nationale*, post raporto de la matematikisto-deputito « *Montagnard* » *Romme*, decidis enbuĝetigi la necesan elspezon por konduki surgrundan provon, kaj ĝin protekti per taĉmento de la « *Garde Nationale* ». (Fakte, *Chappe* jam faris provon per privata eksperimento de sia invento, sed la tiama tre suspektema popolo detruis la instalaĵojn kaj postkuris la instalantojn kiel spionoj.)

La decida eksperimento okazis la 12an de julio 1794 inter Parizo (*Ménilmontant*), kaj *Saint Martin du Tertre* (*Val d'Oise*) birdofluge distancaj je 28 kilometroj. Transdono de 29-vorta mesaĝo postulis nur 11 minutojn; la ricevinta stacio senerare ripetis la mesaĝon kaj respondis per alia. La sciencistaj ĉeestantoj (inter kiuj *Lakanaŭ*) entuziasmiĝis.

La *Convention Nationale* do decidis la 26an de julio 1794 senprokraste lanĉi programon de konstruado de du linioj de optika telegrafo: *Paris-Lille* kaj *Paris-Landau*. *Claude Chappe* estis komisiita ilin urĝege realigi. Kun la apogo de la *Comité de Salut Public*, *Chappe* laboregis pri la selektado de la interaj stacioj, fabrikado kaj muntado de la semaforoj,

formado de staciuloj, (*stationnaires*) kaj la *Convention* ricevis sian unuan mesaĝon la 13an de fructidor an II (30 aŭgusto 1794).

Ĝi informis pri venko de la armeo de la Respubliko, kiu la matenon mem, sturmprenis la urbon *Condé sur l'Escaut*, de la Aŭstroj.

Ek de tiam la reto de linioj de optikaj telegrafoj disvolviĝis. En 1852 ĝi kunligis 4.800 kilometre 29 francajn urbojn. La elektra telegrafo kiu Francie komenciĝis en 1846, iom post iom ĝin anstataŭigis. Ĝia lasta servo okazis en *Krimeo* dum la milito de la Anglo-Francoj kontraŭ la Rusoj en 1854.

Hodiaŭ ekzistas restaĵoj de malnovaj stacioj; kelkaj estis restaŭritaj por turistoj. La *Ecole Centrale de Lyon* okupiĝis pri retrovo de teknikoj kaj sekretaj kodoj; ĝi restaŭris la apudan stacion de *Sainte Foy lès Lyon*.

Henri ROUSSEAU

Recepto de Kokidaĵo kun viskio

Aĉeti kokidaĵon ĉirkaŭ « 1,200 kg », kaj botelon da viskio. Ankaŭ ne forgesu salon, pipron, olivan oleon kaj lardajn tranĉaĵetojn.

Kontroli ke vi havas majoneztubon, por ebla kazo.

Lardkovru la kokidaĵon, ĝin sal, pipri kaj aldoni flueton da oliva oleo.

Antaŭvarmigi la fornon je meza temperaturo (220°C aŭ termoregulo 5) dum 10 minutoj.

Plenigu glason da viskio kaj trinku ĝin.

Enfornigu la kokidaĵon sur taŭga kuira plado.

Plenigu glason da viskio kaj trinku ĝin.

Refari tiun lastan agon.

Post kvarono hoko, forni malfermi por kondroli la kuido de pokikaĵo.

Breni la votelon de biskio kaj trindi granban ujplenonnn.

lomedo malkrue, kvafono da roho... poŝte momento fine, ŝanĉepaĉi ĝis frono.

Malbermi la bordon, reburni, regurni... meti la popikaĵo...nn en alai d'ikerto.

Sidiĝi sur merdegan seĝon kaj timki 2 aŭ 3 glusoj da uisti.

Buiri, tuiiri, kuiri la dodikaĵon bum duome poro.

Kaj hop! 3 gliajn plasojn.

Rebreni egan versaĵo da kokidaĵ... ne da biskio.

Lepvreni la lokidaĵon (kiu falbu planklen), pugiri kaj enĵeli ĝin sur padlon.

Romkipigi la visagon pro grasajo sur la bahelaro de la buirejo.

Ne provi reveliĝi.

Deciti ke oni ja estas surdrunge kaj bini ka fotelon da miskio.

Bli malfrue pamri ĝis litol, domri tiun kiu restas de la notko.

Postan matenon, preni aspirinon, manĝu malvarman kokidaĵon kun majonezo en tubo, kaj purigu la bordelon kiun faris en la kuirejo.

Verontan bultenon: meleagrino kun konjako.

Aliĝilo - Bulletin d'inscription (sekvo)

	Sabato Samedi	Dimanĉo Dimanche	Nombro Nombre	Sume Total
Partopreno Participation	3,00 € par personne			
Tranoktado Nuitée : un lit en chambre de 6 lits	13,00 €			
Mi kampados Tente, Camping-car	6,00 € par personne			
Vespermanĝo Repas du soir	13,00 €	-		
Matenmanĝo Petit déjeuner		3,50 €		
Tagmanĝo Repas du midi		15,00 €		
	SUME:			
	Total:			

Sume:

Montant de mon inscription
et de ma participation :

Dato kaj subskribo :

Date et signature :

Aliĝilo + bankĉeko sendotaj plejmalfrue antaŭ la 18a de majo !
Inscription à découper, à renvoyer au plus tard avant le 18 mai à
Pierre Lemarchand, 2 les Terres Quemines 76113 Hautot /Seine

Akcepto ekde la 9a horo sabate matene. Eblas resti pli longdaŭre. 13€ po nokto (16h-10h), 3,50€ po matenmanĝo. Bonvolu telefoni rekte al la gastejo. « La Chaumière ». Tel. : 02 35 92 60 69.

Eblas kampadi sur la gasteja herbejo. (por tendoj aŭ kampadveturiloj) : 6€ po nokto kaj persono.. Eblas surloke liti littukojn : 4€.

Dormĉambro ĉe la unua etaĝo :
Chambre à 6 lits au 1er étage :



Mangĉambro :
Salle à manger avec sa cheminée :



Dans un clos-masure, grange (chaumière) adossée à un manège (tour à grains), calme (situé en plein champs) et de caractère. Nombreuses possibilités de randonnées. 18 lits. Capacité maximum pour la salle de séjour : 40 p.

Au rez de chaussée : cuisine aménagée, vestiaire, wc, salle de séjour avec cheminée. Chambre de 6 lits individuels, salle d'eau (lavabos, douche, wc privatifs) accessibles aux handicapés.

A l'étage : - une chambre de 6 lits individuels.

- une chambre de 6 lits individuels.

- avec salle d'eau privative et wc pour chaque chambre.


Possibilité de camping dans le pré, tente ou camping-car. 6€ par nuit et par personne. Possibilité de louer sur place des draps : 4€. Petit déjeuner 3,50€.

Accueil à partir de 9h00 samedi 24 mai. Possibilité d'allonger votre séjour avant le 24 ou après le 25 mai : 13€ par nuitée (16h-10h) : 3,50€ le petit déjeuner : Veuillez contacter directement par téléphone le gîte au : tél. 02 35 92 60 69 pour réserver. Merci !

ESPERANTO - NORMANDIE

Une ouverture sur tous les
peuples, toutes les cultures

**Assemblée
Générale :
BETTEVILLE (76)
24 et 25 mai 2008
Ĝenerala
Kunveno**



Gîte de France. Gîte d'étape, de séjour
Ouvert toute l'année. 3 épis. 18 lits.

LA CHAUMIERE

Elisabeth MALHEUVRE

Hameau du Mesnil 76190 BETTEVILLE.


Tel. : 02 35 92 60 69.

la.chaumière.de.B@wanadoo.fr

ESPERANTO - NORMANDIE

Betteville (Seine Maritime - 76) :

Betteville situas proksime de Abatejo St Wandrille Rancón kaj de la urbejo Caudebec en Caux. (apud ponto de Brotonne sur Sejno).



Pont de Brotonne

Renseignements, inscriptions + envoi du bulletin d'inscription et de votre paiement par chèque à :
Informoj + aliĝoj + via ĉeko je :

Pierre LEMARCHAND,
2 résidence les Terres Queunines,
76113 Hautot sur Seine. Tel. : 02 35 34 28 78
LEMARCHANDPI@wanadoo.fr

Pagu al : - Payez à :
ESPERANTO NORMANDIE ccp Rouen 283.40.14
Veuillez noter que votre adhésion n'est valable qu'avec la réception de votre paiement. Merci !
Bonvolu noti ke via aliĝo validas nur post ricevo de via pago. Antaŭdankon !

Programo :



Sabate posttagmeze :

- ◆ Akcepto de la partoprenantoj en la gastejo « la Chaumière » en Betteville.
- ◆ 14h30 Grupa vizito de la urbejo Caudebec en Caux. Prêĝejo Notre Dame (flamgotika stilo), Domo de la Templiers 13a jarcento (muzeo pri loka historio. Ebla vizito, pago de la enirbiletoj surloke), malnova karceroj, tipaj normandaj domoj, riverbordo de Sejno, ktp.

Sabate vespere :

- ◆ 19h00 : komuna vespermanĝo en La Chaumière
- ◆ Interkonatiĝa kaj varia vespero.
- ◆ Tranoktado en la gastejo : « la Chaumière »

Dimanĉe Matene : en la gastejo : 8h00 Matenmanĝo.

Ĝenerala Kunveno : 10a horo precize :

- ◆ Akcepto de la gepartoprenantoj.
- ◆ Morala kaj agadraportoj.
- ◆ Kasa raporto.
- ◆ Normanda Esperanto Bulteno.
- ◆ Renovigo de la estrara komitato kaj voĉdonadoj.
- ◆ Vivo de la lokaj grupoj.
- ◆ Diversaj punktoj : - adreso de la asocia sidejo.

- interna asocia regularo. - estrarkunveno.
- eventuala kontrakto kun Esperanto France.
- organizado de turneoj de prelegantoj.
- kontaktoj kun Malsupra Saksio.
- asociaj materialoj por ekspozicioj.
- disponigo al grupoj de informaj materialoj.
- staĝoj, diversaj renkontigoj.
- landaj, internaciaj, regionaj kongresoj.
- internet poŝaroj.
- .../...

Dimanĉe tagmeze :

- ◆ Aperitivo, komuna tagmanĝo en la gastejo.

Dimanĉe Posttagmeze :

- ◆ Turisma vizitoj :
- Abatejo St Wandrille 15h30 grupa gvidata vizito ĉirkaŭ 1 horo. (2,50 € pagota surloke), aŭ libera vizito, eblas ĝis 21h30. (senpage.)
- aliĝ en Caudebec en Caux, vizito de la muzeo de la « Marine de Seine » (3€ pagota surloke).

Aliĝilo - Bulletin d'inscription

Mi aliĝas al la Ĝenerala Kunveno 2008a
Je m'inscris à l'Assemblée Générale 2008 :
Veuillez cocher les mentions utiles, à remplir en caractères majuscules d'imprimerie. Merci !

☐ Sinjoro - Monsieur ☐ Sinjorino - Madame

Familia nomo - Nom :

Persona nomo - Prénom :

Adreso - Adresse :

Poŝtkodo - Code Postal :

Urbo - Ville :

Telefona - Téléphone :

Ret-adreso - Adresse informatique :

☐ Mi estos akompanata de ☐ personoj.
☐ Je serais accompagné de ☐ personnes.

Mi alvenos en Betteville :

Venverais à Betteville :

☐ Mi deziras prezenti ion esperantlingve dum la varia sabata vespero : _____

☐ Mi partoprenos la grupan viziton sabate en Caudebec en Caux - Je participerai à la visite en groupe de Caudebec, samedi après-midi.

☐ Mi partoprenos la grupan gvidatan viziton de la abatejo Saint Wandrille - Je participerai à la visite guidée de St Wandrille dimanche après midi



Ne forgesu plengi la alian flankon de la aliĝilo. Antaŭdankon !
Veuillez tourner la page et remplir la suite du bulletin. Merci !